

Leterkesto, 3.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.10.31 & 11.02

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Ni daŭrigas nian salutadon al la aŭskultantoj, kiuj sendis mesaĝojn, tio ĉi laŭ la alfabeto ordo de la familiaj nomoj. Kaj ni multe dankas al ĉiuj, kiuj indikis interkrampe per esperanta fonetiko la proksimuman prononcon de siaj nomoj substrekante la familian.

A.- Saluton al Karel KOPECKY en Trebechovice, Ĉeĥoslovakio, pro 4 mesaĝoj. Dum kuraciĝo en banloko li provis nin kapti per eta aparato, dum hejme lia edzino provis ne forgesi registri niajn elsendojn. En dua mesaĝo li eĉ skribas: "...Ni faras ofte ekskursojn en la naturo. Sed kiel ne aŭskulti Bernon! Tial ni prenas malgrandan radio-aparaton enpoŝan kun ni, en naturo aŭ en urboj survoje ni vin kaptas. Tiu aparato estas nur kun du bendoj mezondoj kaj kurtondoj - ĝi nomiĝas G 1020. Gojiga fakto estas, ke mi vin ĉiam kaptas eĉ pli bone ol hejme sur ondolongo 49 metroj. Ekzemple la 22-an de majo ni kaptis vin kaj aŭskultis apud Nove Mesto, sabate la 1-an de junio ni vin kaptis en parko en la urbo Chrudim. Iam la pasantoj miras, en kiu lingvo tio estas. Tiel ni ankaŭ faras propagandon al Esperanto." Konklude Karel KOPECKY skribis: mi enmetas pluajn bildojn en koverton por gesinjoroj Gacond."

Cl.- Tiuj 5 fotoj de folkloraj kostumoj ege plezurigis mian edzinon, kiu mem posedas neŭŝatelan kostumon kaj havas grandan kolekton da bildoj pri folkloraj kostumoj el kiel eble plej multaj landoj.

A.- Koncerne la alsenditan tekston de nia prelegaro pri Svislando Karel KOPECKY ankoraŭ skribis: "Al ni ĝi tre plaĉis, pro tio mi el ĝi parton tralegis en kurso. Ĉar ĝi tre interesis ĉiujn partoprenantojn, ĉiu volis havi propran fotokopian eldonaĵon."

Cl.- Boris KOLKER en Ufa, Sovetio, sendis informojn pri la reeldono de liaj lernolibroj. En la jaro 1982 la revuo "Esperanto" amplekse informis pri tio, ke la Sovet-Unia Sciencpopulara Revuo "Kemio kaj Vivo" publikigis ekspres-kurson de Boris KOLKER, kiu instruis la bazon de la lingvo kaj kapablon legi sciencpopularajn tekstojn. Antaŭ kelkaj monatoj tiu kurso reaperis broŝurforme kiel faksimila eldono sub la titolo "Esperanto dum 16 tagoj". Tiu ĉi jaro estos aparte fruktodona por Boris KOLKER, komitatano de UEA, vicprezidanto de Sovetrespublikara Esperantista Unio (SEU) kaj gvidanto de ties instrumentodika komisiono. Ĉisomere la akademia eldonejo "Nauka" eldonis en kelk-dekmil ekzempleroj lian libron "Lernolibro de la Lingvo Esperanto, Baza kurso". Ĝi estas destinita al ruslingvanoj, sed uzebla ankaŭ alilande.

A.- Por la fino de la jaro la granda eldonejo "Progreso", jam konata pro publikigo de kelkaj valoraj esperanto-libroj, interalie "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins, planas aperigi la libron de Boris KOLKER "Vojaĝo en Esperanto-lando. Perfekta kurso". Ĝi estos internacia eldono, plene en Esperanto, uzebla en ajna lando. Ĝiaj 26 lecionoj estas verkitaj kvazaŭ stenogramo de kunsidoj de iu modela Esperanto-Klubo, dum kiu oni renkontiĝas kun elstaraj figuroj de esperantujo kaj kun ties verkoj. La lecionoj enhavas tekstojn, komentojn, kiuj celas instrui krear ekposedon de la lingvo.

Cl.- Kiuj deziras konatiĝi kun tiuj lernolibroj povas turni sin tra la kanalo de Svisa Radio Internacia al la aŭtoro Boris KOLKER, kies adreson ni volonte transdonos.

A.- Josef KONDOR en Neuwied, Germanio, sendis foton kun Willy GREEN en Browley, kiu siatempe esprimis kritikojn pri niaj elsendoj en Monato. Tiun foton ni konservas en la arkivejo CDELI. Duan mesaĝon li sendis el feriloko Bollendorf, kie li ankaŭ kaptis niajn elsendojn.

Cl.- R. KOPPEL en Ettlingen, Germanio, dankas nome de ĉiuj Esperanto-amikoj en Ettlingen, kiuj uzis kiel temaro-fonto por sia diskutrondo la specimenon de la revuo "Literatura Foiro", kiun ni sendis. Ili bedaŭras pro la malpermeso de reproduktado el tiu revuo, kiun ili trovas kontraŭmovada en zamenhofa senco. Fakte ili miskomprenis la indikon, ke reprodukto en aliaj revuoj de artikoloj de Literatura Foiro nur povas okazi post ricevo de la permeso. Tio estas tute normala reprodukto-kondiĉo, kies neobservo fare de kelkaj movadaj redakcioj atestas pri manko de respekto al la aliaj esperanto-redakcioj. Reprodukto per fotokopia rimedo por celo instrua aŭ grup-kunvena restas ebla, se ĝi estas sen profitocelo.

A.- Saluton al Karel KRAFT en Borotice, Ĉeĥoslovakio, al Ivan KULAKOV en Voroneĵ, Sovetio.

Cl.- Joachim LAGARTIXA (Ĵuakim LAGARTIŜA) en Mora, Portugalio, skribis: "Responde al letero de nederlanda samideanino... vi prezentis kelkajn interesajn komentariojn pri la stilo de certaj aŭtoroj kaj ties neceso enkonduki neologismojn aŭ novismojn. Mi tute konsentas kun via vidpunkto laŭ kiu mankas en Esperanto leksikaj esprimoj konvenaj al elokventaj kaj viglaj priskriboj de pejzaĝoj, animstatoj, nekutimaj etosoj, kaj similaj. Se oni komparas Esperanton kun iu ajn nacia lingvo, oni devas rimarki, ke ĉiu nacia lingvo estas provizita de sinonimoj, samsignifaj esprimoj, metaforoj, ktp. pere de kiuj oni povas diskolorige nuancigi kaj beligi pensojn, ideojn, priskribojn. Tio mankas en Esperanto. Tial mi facilanime konsentas, ke bona verkisto devas senti la bezonon plilarĝigi la leksikan kampon de la lingvo. Kaj ankaŭ aŭtenta legemulo de esperantaj verkoj nepre sentas la bezonon koni la novajn esprimojn kaj stilprovojn elpensitajn de tiuj aŭtoroj.

A.- Ĵuakim LAGARTIŜA daŭrigas skribante: "Ĉi-punkte mi kuraĝu prezenti al vi kaj etan konfeson kaj peton: "Dum la nuna eisendo vi ofte parolis pri Piĉ. Mi tre ŝatus legi verkon de tiu aŭtoro; tamen mi ne scias, kiel mi povas realigi tiun deziron. Kvankam mi neniam raportis pri tio en antaŭaj leteroj, mi estas blinda. Kiel vi probable scias, ekzistas kolektoj da brajlaj libroj en esperanto en pluraj eŭropaj landoj. Tamen tiuj libraroj, kiujn mi cetere konas kaj uzas, ne estas aktualigitaj ekde kelkaj jardekoj. Troviĝas en ili verkoj de Edmond Privat, Zamenhof, Baghy, Engholm, kaj aliaj, sed la novaj tendencoj tute ne estas reprezentitaj. Cetere kompostado de brajlaj libroj estas multekosta afero - kaj la nombro de la esperantistaj blinduloj ne estas sufiĉe granda por pravigi tiajn elspezojn. En Nederlando funkcias ankaŭ aparta biblioteko de surbendigitaj verkoj, la tielnomataj "sonlibroj". Samideanoj laŭtlegis kelkajn librojn, kiujn teknikistoj surbendigis. Tiuj surbendigaĵoj estas je la dispoŝo de la blindulaj samideanoj, kiuj perpoŝte prunteprenas ilin. Tamen, kiel la brajlaj, ankaŭ tiu kolekto ne estas varia kaj ne respondas al la bezonoj de postulema nuntempa esperantisto.

Cl.- Ĵuakim LAGARTIŜA konkludas: "Nu, jen mia propono: eble ekzistas inter la aŭdantaro, iu samideano, kiu povus helpi min. Iu, kiu ŝatus laŭtlegi en Esperanto, havante la necesan libertempon kaj paciencon por surbendigi al mi verkon de Karolo Piĉ. Kompreneble mi liverus perpoŝte la kasedojn kaj ne necesus, ke la afero rapidu. Ĝi povus daŭri eĉ kelkajn monatojn. Li surbendigus nur, kiam li havus tempon kaj mensan disponon. Eble mia propono estas iom nekutima kaj konfuziga. Eble ĝi kondukos al nenio, ĉar mi estas konscia pri la malfacilaĵoj, kiujn ĝi kunportas. Mi dankas vian bonvolemon. Mi devas alfronti kromajn malfacilaĵojn, ĉar en mia regiono ne estas esperantistoj, al kiuj mi povus peti helpon."

A.- Eble aŭskultanto sentos sin alvokita pozitive reagi al tiu alvoko kaj akceptos laŭtlegi por registrado la libron "La Litomiŝla Tombejo" de Karolo PIĈ. A1 li ni volonte transsendos la adreson de nia blinda aŭskultanto Ĵuakim LAGARTIŜA, kiun ni resalutos la venontan semajnon, ĉar li interese respondis al demandoj, kiujn ni faris post ricevo de la citita letero.

Cl.- Vi aŭdis leterkestan elsendon de Svisa Radio Internacia, kiun ni daŭrigos venontsemajne. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andree GACOND. Ĝis la reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*